ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 9

SEPTEMBRO 2017 Kol.389/33

xxxx

ke la virino jam antaŭe estis ekzamenita de kuracisto, tiam oni malkovris nenion tiurilate.

Laŭ ŝia supozo, ŝia aĝo estis la kaŭzo de malkomforto en ŝia okulo. Jam de 35 jaroj ŝi uzas unufoje uzeblajn kontaktlensojn kaj ŝi agnoskis, ke ŝi foje enmetis alian novan, ne trovinte tiun supoze perditan. La oftalmologo Rupal Morjaria, kiu prizorgis tiun kazon, komentis: „Ni surpriziĝis, ke ŝi neniam rimarkis tion. Certe la afero havigis al ŝi multe da okula turmento“.

La kirurgio estis prokrastita ĝis elimino de risko pri interna inflamo de la okulo. Tio okazis novembre pasintjare, sed nur nune ĝi estis diskonigita de brita medicina gazeto.

Tradukita de Paulo Cesar Pires, el portugal-lingva artikolo.

Ĉeĥaj Fervojoj transportis handikapitojn en ekstra trajno

Regiona komerca centro de Ĉeĥaj Fervojoj (*ČD*) aranĝis marde la 16-an de majo 2017 tradician ĉiujaran ekskurson en trajno por handikapitaj klientoj okaze de la semajna restado kun medicina prizorgado en *Česká Třebová*. La ĉi-jaran aranĝon sub protekto de la vicurbestrino de la urbo *Česká Třebová*, *Jaromíra Žáčková* (la urbo alinomata de iuj „urbo de fervojistoj“ pro fervoja nodo, fervoj-entreprenoj,

porfervojistaj lernejoj kaj porstudenta domo *Skalka*) partoprenis ĉirkaŭ sepdek pasaĝeroj.
Krom lokaj klientoj en la trajno vojaĝis ankaŭ kelkaj infanoj el handikapito-centro „Mano por vivo“ el la proksima urbo *Litomyšl.* Celo de la ekskurso, por kiu *ČD* disponigis la motorvagon-kombinaĵon *Regionova* el lokomotivdeponejo *Česká Třebová,* estis *Velké Losiny***.**
Tie la ekskursantojn atendis vizito de la kastelo, muzeo pri mane farita papero kaj promeno en kastela parko. Aliaj provis la forton de termoakvo en la loka kuracbanejo. La aranĝo okazis enkadre de plenumo de sociala respondeco de la nacia trafika laborantaro. Jindřich Tomíšek

Eŭropa Unio:

Ĉu fervojo estas pli rapida ol aviadilo?

Aviadilo estas la plej rapida trafikilo el ĉiuj. Tamen ne ĉiam estas tiel, ne ĉiam vi estas per aviadilo pli frue en la vojaĝa celloko. Al tiuj kazoj apartenas tre frekventata transportinterligo Munkeno – Vieno. Sur tiu ĉi transportinterligo ĉe uzo de la fervojo eblas akiri tempon, kaj eĉ la vivmedio profitas. Vojaĝanto en trajno ŝparas ĉirkaŭ 49 litrojn da brulaĵmiksaĵo, respektive 1,22 kg CO^2, kompare kun vojaĝanto en aviadilo.

Kiu do por vojaĝo elektos aviadilon, ĉar li opinias, ke tiu lasta estas pli rapida, estas surprizita: per trajno li atingas la celon je 15 minutojn pli frue (fervojo: 4:00 horoj, aviadilo: 4:15 horoj). Al tiu ĉi rezulto vi venas baze de la programo “*Earth Day*“ el portalo „*Go Euro”*, kiu komparas trajnon, aŭtobuson kaj aviadilon tra Eŭropo. Por klarigo de ĉi tie menciataj flugitineroj

estas bezonata alkalkuli tempon por pasaĝer-prizorgado antaŭvetura, kaj sekurec-kontrolojn en flughavenoj.

Laŭ traesploro trajno estas en 25 trajnkursoj pli rapida kaj pli favora al vivmedio ol aviadilo, kaj la tempoŝparo estas kelkfoje eĉ pli granda, ol en kazo ekzemple Munkeno – Vieno. Ekzemple eblas ŝpari malpli ol unu horon ĉe trafikitineroj Bruselo – Parizo, Bruselo – Londono. Ĉe aliaj itineroj ŝparo estas pli ol unu horo, ekz. Marsejlo – Liono, Barcelono – Madrido, aŭ Londono – *Leeds.* *J. Tomíšek*

Nekutima maniero en banka agentejo

Pasintsemajne en Fejsbuko la instruistino Maria Isabel Paiva raportis okazaĵon, kiu kortuŝis ŝin. Dum ŝia atendado ĉe agentejo en la banko "Caixa Econômica Federal" en la urbo Volta Redonda-RJ (Brazilo) – ŝi vidis iun estron, kiu sidiĝis surplanke antaŭ fizika handikapulo por priservi lin.

"Mi estis rigardanta la ĉirkaŭaĵon kaj subite mi rimarkis tiun sinjoron, kiu alproksimigiŝ kaj sidiĝis sur la planko, babilis kaj ridetis al la handikapulo. En tiu momento mi rimarkis, ke li estis priservanta tiun handikapitan personon", tion diris Maria Isabel.

"Mi estis deĵoranta ĉe mia labortablo interne de la agentejo, kiam nia helpantino al klientoj ĉe enirejo, sciigis min, ke sinjoro José bezonas ŝanĝi sian pasvorton. Nu, mi iris tien alportante la koncernan aparaton kaj pro lia korpa malhelpo mi sidiĝis antaŭ li por tiu tasko", tion informis Luiz Cláudio. Krome – "Prizorgi aliulojn kiel prizorgi sin mem, eĉ per simplaj agoj, ja estas ek-

zemplo pri bona konduto”. Tiu epizodo mirigis la homojn tie, kaj en la socia retejo la rilata afiŝo furoris.

Tradukis Paulo Cesar Pires el portugallingva artikolo

La 45-a Lingva seminario en HODONÍN ĉe KUNŠTÁT de la 24-a ĝis la-28-a de aprilo 2017

Kutime la lingvaj seminarioj sub gvidado de Jindřiška Drahotová okazas en Skokovy. Ĉi-foje ĝi okazis en Hodonín ĉe Kunštát tuj post la AEH-kongreso de lundo ĝis vendredo. La eventon partoprenis 30 geesperantistoj kun eksterlandaj gastoj el Bulgario, Francio, Nederlando kaj Slovakio.

Laŭ kutima skemo matene oni komencis la tagon per gimnastiko. Post la matenmanĝo okazis tri kursoj diversnivelaj. La komencantojn instruis Jindřiška, pli spertajn perfektigis Magdalena Fejfičová (Fejfi) el Slovakio kaj paroligan kurson gvidis Margit Turková.

Post la bongustaj tagmanĝoj estis libera tempo por promenadoj. Ni vizitis la urbon Kunštát kaj la proksiman artefaritan groton de "Blanických rytířů" (Kavaliroj de Blaník). Antaŭ la groto ni admiris majestan leonon gardantan la eniron. Surprizis la grandegaj figuroj de la kavaliroj kaj sankta Venceslao sur ĉevalo ĉizitaj en la sabloroko. La admirindan verkon postlasis la juna amatora skulptisto Stanislav Rolínek. Bedaŭrinde el la 13 metrojn alta statuo de la unua ĉeĥa

prezidento T. G. Masaryk restis nur la botoj. Pro ideologiaj kaŭzoj kaj ne konvenaj cirkonstancoj dum la dua mondmilito la impona statuo estis detruita.

En apuda ĝardeno ni admiris belajn skulptaĵojn el ligno kaj metalo. Ili originis el diversaj internaciaj simpozioj. Niaj okuloj ne povis pretervidi miniĝardeneton kun floroj en ŝuoj.

Por posttagmezaj promenadoj formiĝis diversaj grupoj de personoj. Iuj vizitis belvidejon kaj aliaj promenis tra arbaro. Kun la franca paro Laysemann kaj Pavol Petrik el Slovakio mi vizitis la 30 km malproksiman urbon Polička. Tie ni admiris bone konservitajn ĉirkaŭurbajn murojn, placon kun pestokolono. En la urbo naskiĝis la konata ĉeĥa komponisto Bohuslav Martinů. En proksima tombejo troviĝas lia tombo.

Ĉiutage je la 16-a horo komenciĝis kreiva ateliero pri artaĵoj sub la gvido de Mirka Kosnarová, spertulino pri manlaboroj. Interesiĝantoj kreis diversajn objektojn el bidoj, pentris sur antaŭpreparitaj modeloj, el buŝtukoj formis papiliojn, per vaksaj kolorskribiloj fanditaj sur gladilo kreis diversajn bildojn kaj ankaŭ kolorigis mandalojn.

Jana Křížková prezentis tre bone ellaboritan dokumenton kun multaj bildoj pri la 101-a UK en Nitro kaj ankaŭ tre profesie

faritan prelegon pri nia Majstro L. L. Zamenhof.

Jindřiška Drahotová prezentis multajn librojn, kiujn ŝi tradukis. Je dispono estis albumoj pri diversaj Esperanto-eventoj pretigitaj de mi. Krome oni povis trarigardi kronikon de la Esperanto-klubo el Pardubice.

Por la lasta, amuza vespero la grupeto de komencantaj lernantoj pretigis kelkajn skeĉojn. Lazar Karakaŝev el Bulgario rakontis ŝercojn. Mi donis al interesiĝantoj la taskon skribi unu frazon enhavantan ĉiujn ĉapelitajn literojn. Poste mi legis la rezultojn kaj tri lotumitajn bonŝanculojn mi rekompencis per bildkarto pri Parizo. Krome ili ricevis etan ĉokoladon kun bildigita Eifelturo. Jindřiška Drahotová deklamis poemon, Pavla Dvořáková prezentis sur ekrano mallongan fabelan filmeton el hungara reto. Ŝi ankaŭ gitarludis kaj kantis. Floreal prezentis mallongan filmeton pri la Novjara ĉina festo en Parizo kaj varbfilmon pri Venezuelo Esperanten tradukitan.

De Pavla Dvořáková ni eksciis la tristan novaĵon pri la forpaso de la famkonata ĉeĥa operkantisto Miroslav Smyčka, kiu pasintjare en novembro festis sian 90-jaran jubileon. Pavla dediĉis al lia memoro filmeton el tiu festo kaj kelkajn melankoliajn kantojn. Krome ŝi gvidis kurson pri ĉiĉeronado. Komune ni tradukis tekston pri Kunštát por Vikipedio. Ŝi

montris multajn komputilajn retejojn kaj instruis, kiel atingi ilin. Vespere ŝi ludis gitaron kaj ni kantis esperantigitajn ĉeĥajn kanzonojn.
Ni ĝuis agrablan restadon, lernis kaj multon eksciis pri retumado. Bedaŭrinde nur la vetero dum la semajno ne favoris nin, malvarmis, ofte pluvis kaj la lastan tagon matene surprizis nin la neĝkovrita ĉirkaŭaĵo de la domo. Tamen la etoso en la restadejo estis varma kaj agrabla. Liba Gabalda

Denove trista informo:

La 15-an de majo 2017 forpasis nin multjara AEH-membrino **Blanka Zubová** (1929-2017), pentristino. Pri ŝia forpaso ni nur legis en la gazeto Starto. Honoron al ŝia memoro. red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 300,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.